



# A.E.A.-informilo

Numero 9

Oktobro 2011

## Seleco kaj **A.E.A.-informilo** en la biblioteko de U.E.A.

Nia presorgano HELECO, jam ekde ĝia ekapero, estis sufiĉe disvastigita en la esperantistaj medioj. Multaj E-grupoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, ricevadis dum kelkaj jaroj la ekzemplerojn de ĉiu nova numero de nia revueto. En iu epoko la enhavo de la gazeto estis dulingva – hispana kaj esperanta– por esti distribuata ankaŭ en publikaj centroj de nia asturia regiono. La provo ne estis sukcesa en kio koncernas al la diskonigo de Esperanto en la socio, kaj HELECO denove fariĝis publikaĵo destinita al la geesperantistaro. Baldaŭ poste ekaperis nia paĝo en *Interreto*, kaj ene de ĝi la revuo fariĝis alirebla por plej granda nombro da personoj en la mondo. Tamen, en papera formo HELECO plu estis distribuata al kelkaj E-asocioj, inter ili HEF. Sed estis por ni granda haj agrabla surprizo konstati ke nia presaĵo vekis la intereson de aliaj plej altaj esperantistaj instancoj. Sekve ni transskribas la mesaĝon kiun ni ricevis tiurilate el S-ro. Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de **Universala Esperanta Asocio**.

*Al Astura Esperanta Asocio:*

*Estimataj,*

*Kun granda intereso mi foliumis en via retejo numerojn de via organo "Heleco", pri kies ekzisto mi rememoris pere de "Boletín" de HEF. Jam pli frue mi eksciis pri ĝi kaj jam tiam intencis skribi al vi, sed ial mi fine forgesis fari tion.*

*Mi elkore gratulas vin pro tiu riĉenhava kaj bela eldonaĵo! Oni tuj konjektas, ke malantaŭ ĉiu numero necesis grandega laboro kaj tial estas vere admirinde, ke ĝi aperas jam tiel longe. Mi esperas, ke en estonteco ĝi aperos eĉ ankoraŭ pli longe!*

*Malfeliĉe "Heleco" mankas en la Biblioteko Hector Hodler de UEA. Se mi bone kontrolis, mankas ankaŭ via alia organo, "AEA-Informilo".*

*Mi tre ĝojus, se vi povus sendi al UEA la jam aperintajn numerojn, kaze ke ili ankoraŭ haveblas, kaj ankaŭ estonte sendi ilin. La biblioteko de UEA estas unu el la*

*ĉefaj Esperanto-bibliotekoj kaj sufiĉe ofte vizitata de esploristoj. Ju pli kompleta estas ĝia kolekto, ankaŭ koncerne Esperantajn revuojn, des pli utila ĝi estas. Estas laŭdirinde, ke viaj organoj estas konsulteblaj rete, sed ĉar ili estas enhance tre valoraj kaj zorge farataj, estus bone, se ili povus esti konservataj ĉe UEA en papera formo kaj tiel esti alireblaj al pli da interesitoj. Se vi povos kontentigi mian peton, mi estos tre danka al vi. Antaŭ ĉio mi ankoraŭfoje gratulas ĉiujn, kies krea frukto estas la du organoj, kaj deziras multe da sukcesoj ankaŭ estonte!*

*Kun samideanaj salutoj,*


*Osmo Buller*

*Ĝenerala Direktoro*

*Universala Esperanto-Asocio*

La biblioteko de UEA portas la nomon de la fama svisa esperantisto Hector Hodler. Ĝi troviĝas en Roterdamo kaj estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj, kun proksimume 20.000 libroj, cetere kun periodaĵoj, manuskriptoj, fotoj, sondiskoj kaj aliaj kolektaĵoj. Tiu biblioteko troviĝas en la ĉambro **Zamenhof** en la nova alo de la Centra Oficejo. Partoj de la arkivo de UEA troviĝas ankaŭ en aliaj ĉambroj. La Biblioteko Hector Hodler (BHH) okupiĝas ĉefe pri la lingvo Esperanto kaj parencaj temoj. Al la plej malnovaj libroj apartenas la "Unua Libro", kiun la lingvo-fondinto L. Zamenhof publikigis en 1887. Esplorantoj trovas materialojn pri Esperanto-literaturo kaj lingvistiko, pri aliaj planlingvoj kaj pri lingvistikaj kaj internaciismaj temoj ĝenerale.

De nun tiu grava biblioteko enhavos ankaŭ la kolektojn de HELECO kaj **AEA-Informilo** kiujn ni pretigis por ĝi, kaj regule ricevdos la estontajn eldonaĵojn de tiuj organoj kiujn ni faros de nun. Por **Astura Esperanta Asocio** estas tre granda honoro ke nia modestaj pres-organoj staras en tiu gravega centro de la tutmonda esperantista kulturo.




S-ro Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de U.E.A.

HELECO-kolekto destinita al la Biblioteko de U.E.A.

# Nova sidejo de A.E.A.



Laŭ decido de la **Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo**, en kiu estas enkadrigita nia esperantista Asocio, la sidejo de nia E-grupo estis ŝanĝita lasttempe. La nova ejo de **Astura Esperanta Asocio** troviĝas en la Universitata Areo (Kampuso) de Vieskes, konkrete, en tiu konstruaĵo nomata "Norda Aŭlaro". Oni eksplikas ĉi tie la manieron alveni al tiu loko.



La apuda bildo prezentas la konstruaĵojn de ambaŭ Aŭlaroj, la Norda kaj la Suda, kaj utilas por vidi la itineron ekde la buso-haltejo ĝis la enirejo plej proksima al la loko kie troviĝas nia ejo. La bus-haltejo nomiĝas "Aularios" (en la hispana lingvo) kaj apartenas al la 18-a bus-linio de Gijón. Por iri ekde tiu loko al la enirejo de nia sidejo sufiĉas transiri la ŝoseon kaj iri bordigante maldekstren la eksterajon de ambaŭ Aŭlaroj ĝis la lasta pordo (maldekstre) de la "Norda Aularo".

La enirejo plej proksima al nia ejo en la konstruaĵo, (kiun oni povas vidi en la apuda fotografado) estas la lasta en la kurba muro de la domo, se oni aliris tien tra la ekstera parto de la konstruaĵo. Sed oni povas adresiĝi al tiu loko ankaŭ tra la interno de la domo, tio estas, irante laŭlonge de la kurba koridoro ĝis la fino de tiu pasejo, kie troviĝas la ĉambro destinita al nia Asocio.



Fine de la kurba koridoro, se oni iris tien tra tiu vojo, aŭ fronte al la pordo, se oni venis de ekstere, troviĝas la ejo asignita al nia E-Asocio, kiu aperas en la apuda bildo. La enirejo estas en la flanko koridoro. La adreso de tiu loko estas:  
**Asociación Asturiana de Esperanto  
Aulario Norte.  
Campus de Viesques (33203-GIJÓN)**

Apude aperas bildo de la interno de tiu ejo. Ĝi estas sufiĉe komforta loko, sed, mal-feliĉe, ĝi ne estas tiel ampleksa kiel la antaŭa loko, je kiu ni disponis ĝis nun en la centro de la urbo.

Pri tiu loko de nia sidejo kaj la maniero alveni tien estas plia informo en nia retpaĝo, adreso:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/ejo/ejo.htm>





# Laŭeble agado

La ĉefa tasko de esperantista rondo kia nia AEA estas la disvastigado kaj instruado de la internacia lingvo Esperanto. Laŭtradicie tiu instruado estis realigita ĝis nun en la E-movado per la organizado de kursoj de Esperanto. Kiel scias ĉiuj geesperantistoj, la lernantaro de la internacia lingvo neniam estis granda, kaj inter tiu lernantaro estis kutime varbitaj la aktivuloj de la esperantista movado. Nun ni troviĝas antaŭ iu stranga realaĵo. Tute mankas lernantoj de Esperanto. En nia E-Asocio, same kiel en multaj aliaj E-grupoj en la lando, dum la lastaj jaroj ne eblis realigi kursojn de Esperanto. Paralele malfortiĝas ankaŭ la esperantistaj asocioj. De antaŭ kelkaj jaroj eniris neniu nova membro en nia **Astura Esperantista Asocio** kaj dume forpasis kelkaj el niaj antikvaj aktivuloj, kaj inter la membraro kiu restas malpligrandiĝas aŭ tute ĉesas la poresperanta aktivado.



Tial ke tiu fenomeno estas sufiĉe universala, estas normale ke ofte oni parolas kaj skribas pri situacio de krizo en la internacia esperantista movado. Sed okazas ke dume la ĉeesto de Esperanto en **Interreto** senĉese kreskas. Hodiaŭ la nombro da ret-paĝoj en la internacia lingvo estas proksimume 20 milionoj kaj tiu nombro plue kreskadadas. Tio igas nin pensi ke iuj, iam kaj ie lernas Esperanton. Ŝajnas ke kio krizas en la nuna tempo ne estas Esperanto kaj ties disvastigado sed la ĝisnuna formo de de la E-movado, t.e. la esperantistaj grupoj, asocioj, kluboj, federacioj... La interesitoj pri Esperanto trovas nun ĉion en la monda reto: kursojn, librojn, ĵurnalojn, literaturon, diskojn, korespondamikojn....

Do ni devas pristudi la eblan agadon por plenumi nian taskon en la novaj cirkonstancoj kaj adaptiĝi al la situacio. En tiu linio, kvankam ni nepre profitu ĉiujn eblecojn organizi E-kursojn kiam

estus gelernantoj interesitaj pri la afero, tamen, devas zorgi potencigi nian ĉeeston en la monda reto kie nia paĝaro estis jam sufiĉe perceptita. Ju pli riĉa estos la esperantista enhavo en **Interreto** des pli estos konata de la publiko la internacia lingvo kaj vekos amasan intereson.

Do, ni intencu organizi E-kurson en la nova ejo de nia Asocio, kaj tiusence oni petas la kunlaboron de la membroj de la grupo. Estus necese organizi ankaŭ la deĵoradon en tiu sidejo: ĉiulunde kaj ĉiumerkrede de la 18-a horo ĝis la 20-a.

La kunlaboro estas necesa ankaŭ por pridemarŝi la ret-paĝon kaj pliriĉigi ties enhavon. Kiel sciante, inter la materialo kiun oni publikigas tie estas ankaŭ la sinsekvaj numeroj de la revuo **HELECO**, kvankam oni presigas kelkajn ekzemplerojn el ĉiu nova numero eldonita. Lasttempe, okaze de vojaĝo de la sekretario de nia Asocio al Madrido oni transdonis ekzemplerojn de la du lastaj numeroj de nia presorgano al la bibliotekoj de **Hispana Esperanto-Federacio** kaj **Madrida Esperanto-Liceo**.

Ankaŭ oni enkondukis pluajn novajn materialojn en la ret-paĝo de AEA., kies enir-adreso estas:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/index.html>

Ne nur nia membraro estas invitata partopreni en la ellaborado de publikigebla materialo en la ret-paĝo sed ankaŭ la legantaro de tiu paĝo povas publikigi ĉe ĝi siajn proprajn alportajojn, konsiderante ke estas akceptata ĉiutipa temaro sen pliaj limoj ol la respekto al la personoj: artikoloj, tradukaĵoj, recenzoj, eseoj, studoj, raportoj, rakontoj, intervjuoj, historiaj priskriboj, turismaj informoj, debatoj, kongres- kaj kurs-anoncoj...



## Alia modelo de evangelizado



- 1: Jesuo anoncis la Ĉielan Regnon kaj tio kio venis estis la Eklezio
- 2: Kun la Eklezio ni koliziis
- 3: La oficiala religio
- 4: La abomeninda heredaĵo de la 4a jarcento
- 5: La Eklezio testamenta administranto kaj heredinto de la imperio
- 6: Suprenleviĝo kaj plifirmiĝo de la papeco

## AL LA GEESPERANTISTOJ EL LA TUTA TERGLOBO

Karaj gesamideanoj el la tuta mondo! Kunlaboru de Esperanto kaj Interreto estas tre potenca ilo por la diskonigado de ideoj, opinioj kaj informoj. Se vi konsideras ke ĉi tiuj artikoloj estas interesaj, kaj vi volas kontribui plibonigi ilian tekston en en via gepatra lingvo, vi povas indiki al ni erarajn kiujn vi trovos en la koncerna teksto por ke ĝi estu riparita. Sendu viajn notojn al la retpoŝta adreso: [casturias@telecable.es](mailto:casturias@telecable.es) Dankon.

Plua materialo en nia Interreta paĝo



## Madrida Bitoteko proponas ret-bibliotekan kunlaboron

Hispana Esperanto-Federacio komencis antaŭ du jaroj ampleksan projekton, kies celo estas konservi la komunan kulturalan heredaĵon de la esperantistoj. Por tiu celo oni kreis "bitotekon", kiu unue estos deponejo por dokumentoj de la Biblioteko Juan Régulo kaj eldonaĵoj de aliaj iberiaj bibliotekoj, kaj poste povos esti deponejo por la tuta esperantistaro. Kompleta informo pri tiu temo estas en artikolo de Ana Manero, kiun oni povas vidi en reto-paĝo de *Libera Folio*, adreso:

<http://www.liberafolio.org/2011/madrida-bitoteko-proponas-retbibliotekan-kunlaboron>

La Projekto Bitoteko fontis el duobla konstato: unue, ke la Biblioteko Juan Régulo Pérez ne povas multe pli kreski ene de la mallarĝaj limoj de la asocia sidejo kaj due, ke la hodiaŭaj teknologioj, ebligas plenumi la duoblan celon de ĉiuj Esperanto-bibliotekoj: faciligi la aliron de la uzantoj al iliaj dokumentoj kaj konservi nian komunan kulturalan heredaĵon. Dum la manko de spaco, draste limigas la eblecon de bibliotekoj kreskadi per tuŝeblaj materialoj, la proponita solvo donas la ŝancon disponigi en la reto parton de la jamaj dokumentoj – tiujn ne plu sub aŭtor-rajtoj – kaj ankaŭ tiujn kreitajn rekte en bita formato.

Paralele, do, al la plua mastrumado de sia, ni diru, “tradicia biblioteko”, HEF proponis la kreadon de kroma “bita biblioteko”. La iniciatintoj de tiu projekto konsciis pri tio, ke multaj similaj projektoj certe jam aperis en la movado: kial ne, do, labori kune kun aliaj samideanoj? La nunaj teknikaĵoj tion ebligas. Ĉu ne oportune plene malfermi la projekton al aliaj institucioj, tiel ke la Bitoteko estu konsiderata projekto ne de HEF, kvankam iniciatita de ĝi, sed de la tuta esperantistaro? Oni konsideru, ke multaj E-bibliotekoj kaj asocioj havas valoran bibliografian materialon indan je konservado kaj diskonigo, kaj ke per kunlaboro oni povus kompletigi kolektojn – ofte disajn kaj mankajn, ĉefe se estas malnovaj eldonaĵoj – kaj proponi al interesatoj kaj esploristoj kiel eble plej ampleksan kaj riĉan datumbankon. Unika deponejo de komune konstruita bibliografia kolekto konsiderinde faciligos la trovon de Esperanto-dokumentoj kaj donos koheran bildon de ampleksa bibliografia produktado.

Projekto tia estas vera defio de kunordigo, kaj – ĉar tiel ampleksan – konsilindas realigi ĝin paŝo-post-paŝe, per fiksado de sinsekvaj malgrandaj celoj, kies plenumado konduku nin al la fina realigo de la projekto. Fina celo estas konstrui inter ĉiuj, laŭ profesiaj kriterioj, kiel eble plej ampleksan bibliografian datumbankon

kapablan konkurenci kun similaj profesie kreitaj bitdeponejoj, kompletigante tiel la diversajn kolektojn de ĝisnunaj eldonaĵoj. Por tio oni bezonas plenumi ĉi partajn celojn: unue, konservi bitigitajn dokumentojn jam ekster aŭtor-rajtoj troviĝantajn en esperantistaj bibliotekoj aŭ asocioj kaj doni aliron al ili; due, konservi kaj alirebligi la ĉiam pli abundajn denaske bitajn dokumentojn; kaj trie, engaĝi aliajn bibliotekojn, asociojn kaj esperantistojn, kiuj provizu nin per dokumentoj kaj laborforto. Certe grupoj kun longa historio disponas abundon da interesa bitiginda materialo. Kaj certe ankaŭ ekzistas samideanoj al kiuj plaĉas la ideo kunlabori en projekto kies sukceso plifaciligos la aliron de esploristoj kaj aliaj interesatoj al la valoraj havaĵoj de nia kulturo. En ĉi bitdeponejo trovu sian lokon, do, same bitigitaj dokumentoj kiel dokumentoj origine bitaj, el kiuj la plej abundaj specoj sendube estos gazetoj, libroj, fotoj, videoj, sonregistroj, kaj gazet-eltondaĵoj, sed kie poiome kolektiĝos ankaŭ mapoj, partituroj, afiŝoj, arkiv-dokumentoj kaj alispecaj kuriozaĵoj.

La projekto bezonas homojn, kiuj laŭ siaj ebloj kaj ŝatoj kunlaboru en la necesaj taskoj. Estos bonvenaj ankaŭ helpaj komputilistoj kaj tradukantoj. Sed, ĉefe, oni bezonas scii ĉu iuj jam entreprenis similan projekton kaj ŝatus kunigi fortojn. Nepras granda laboro de kunordigo kaj interkonsento pri pluraj aferoj, kaj tiucele oni devos krei forumon, kiu permesu al la kunlaborantoj facilan interkontakton. Kaj certe estas jam multaj bitigitaj dokumentoj disigitaj en multaj lokoj, eble ne en la plej konvena formato, sed kiuj povus jam provizore aliri la kolekton. Eventuale estonte oni povos anstataŭigi ilin per pli kvalita bitigaĵo.

Kiel oni povas vidi, temas pri tre ampleksa kaj ambicia projekto, kies realigado postulas multe de laboro, sindediĉo kaj entuziasmo. Kunlaboro estas ĝia esenco. Bele, se multaj samideanoj emus kunkonstrui tiun esperantan Bitotekon!